TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 08, aŭgusto 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Anonco:
## Jarkunveno de EFNSK

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*

La Jarkunveno de EFNSK okazos dimanĉon la 3an de septembro je la 10a horo matene. Ĝi okazos virtuale per la programo Zoom.

https://us06web.zoom.us/j/84139693478?pwd=MTc0TG9CSGNQNVF0b0JYekNFbzFCZz09
(Kunveno ID: 841 3969 3478 Paskodo: 496712)

La estraro demisios kaj la postenoj estos atribuitaj dum la jarkunveno.

Ĉiuj kandidatoj, inkluzive de tiuj, kiuj jam estas estraranoj, devas esti kandidatigataj kaj subtenataj. La kandidatoj devas ankaŭ konsenti, per retpoŝto, ke li aŭ ŝi akceptos la postenon. La sendanton de la unua kandidatigo oni konsideros kiel la proponanton, la duan kiel la subtenanton. Ambaŭ devas esti financaj membroj de EFNSK.

Laŭ la nova statuto de la Federacio (legebla ĉe http://esperantohouse.org.au/eo/about-us/), se iu estis estrarano seninterrompe dum naŭ jaroj aŭ pli, speciala rezolucio devas okazi, por permesi lin aŭ ŝin esti kandidatigata (kaj elektota) dum pluaj periodoj. Tial, ni voĉdonos pri la jena rezolucio (en la angla) dum la jarkunveno:

- That Nicole Else, Alan Turvey and Dmitry Lushnikov be permitted to be re-elected as directors.

Membro povas esti kandidatigata por unu aŭ pli el la jenaj postenoj:
- prezidanto
- vicprezidanto
- ĝenerala estrarano

Sendu kandidatigojn rete al: nsw@esperanto.org.au
Aŭ poŝte al: EFNSK, Esperanto House, 143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Ni esperas, ke vi povos ĉeesti la jarkunvenon. Bonvolu sciigi nin, ĉu vi ja intencas ĉeesti aŭ ne kaj se jes, ĉu vi deziras ĉeesti persone aŭ virtuale. Ankaŭ bonvolu sciigi nin se vi deziras esti kandidatigata por la estraro aŭ povas iel helpi la Federacion. Se vi NE povos ĉeesti sed tamen ŝatus voĉdoni, vi povas peti iun voĉdoni nome de vi (kiel via mandatulo). Bonvolu kontakti nin se vi ŝatus pli da informoj.

Ni ankaŭ feliĉus aŭdi viajn komentojn, ideojn, ktp, por la venonta jaro.

## Membreco de EFNSK

*Alan Turvey, direktoro de EFNSK*

Asocioj estas kreataj por establi forton kaj unuecon en laborado al komunaj celoj en preskaŭ ĉiu kampo. Jen kial Esperanto NSW formiĝis. Krom laborado por celoj, nia asocio antaŭenigas la mensan, socian kaj lingvan bonfarton de niaj membroj.

Nia asocio ofertas kelkajn palpeblajn avantaĝojn—kiel la gastoĉambron, la bibliotekon, la kunvenejon, diversajn informojn pri eventoj, senpagajn aferojn je ek-aliĝo, senpagajn picojn ĉe iuj kunvenoj, asekuran kovron ĉe Esperanto-Domaj eventoj — kaj same, multajn netuŝeblajn avantaĝojn, kiel interkonektadigon de membroj, senton de komunumo kaj komunan celon, kaj eĉ la ŝancon volontuli.
Preni ĉiujn tiujn avantaĝojn sen pripensi fariĝi membro, mi opinias, estas maljuste al tiuj, kiuj senhezite pagis kotizon kaj al la esperantistoj kiuj venis antaŭe kaj tiom multe kontribuis.

Kompreneble, homoj, kiuj havas tre striktajn buĝetojn, devas peti helpon, ĉar la asocio ne volas forturni homojn.

Krom la supre menciitaj, Esperanto NSW helpas homojn:
- ricevi helpon pri via lingvolernado.
- renkonti Esperanto-parolantojn por ekzerci viajn lingvokapablojn kaj akiri novajn amikojn kiuj same amas Esperanton.
- partopreni en Esperanto-aranĝoj.
- kontribui al la evoluo de la Esperanto-movado en NSW.
- engaĝiĝi en la Esperanto-komunumo je loka nivelo.
- trovi rimedojn kaj materialojn kiuj ne estas disponeblaj por la ĝenerala publiko.
- kunlabori en kreaj kampoj kaj/aŭ kun tradukotaĵoj.

La fruaj esperantistoj kontribuis multe de sia tempo kaj mono por fondi Esperanto-Domon kaj fari ĝin daŭrigebla. Sed iu ajn organizo disfalos sen interesata membreco.
Kontribuante al la Esperanto-movado en NSW, vi gajnos, ni kolektive gajnos, kaj la mondo de Esperanto gajnos. Do, se vi ne jam faris, bonvolu montri vian subtenon farante malgrandan investon de la membrokotizo ĉe la retpaĝo "Pri Ni" ĉe esperantohouse.org.au.

## Gasto el Japanio

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*

La 30-an de aŭgusto la Esperanto-domon vizitis gasto el Japanio, Yuri MACHIDA. Ŝi eklernis Esperanton antaŭ ok monatoj kaj nomas sin mem kiel komencanto. Jonathan, James, Kaja kaj mi renkontis Yuri. Ni vespermanĝis kune kaj multe babilis.
Yuri planas resti en Sidnejo tri tagojn, viziti Bluan Montaron, flugi al Nov-Zelando kaj poste reveni en Sidnejo la 11-an de septembro por 2 tagoj. Ni havos eblecon renkonti ŝin denove.





EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo: 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estrarano: | Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Luŝnikov |